

LA SUNO HISPANA

Direktoro-Administranto ★ Director-Administrador

Augusto Jimenez Loira

PINTOR LÓPEZ, 3 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

ENHAVO: Tomás Trenor.—La Kvina Kongreso.—La Patrinetto.—Bibliografio.—Hispana Societo por pro-
mundo de Esperanto.—Kroniko.—La Konstanta Komitato de la Kongresoj.—Memorindaĵoj Da trevenoj de Julio.
—Actara Statistiko.—Progresado de Esperanto.—Spritludoj kaj Diversaĵoj.—Anoncoj.

Tomás Trenor

Jen nomo, kaj homo, kiu estas tre famkonata tiel en Valencio, kiel en tuta Hispanujo. Distinginda Artileriestro, li posedas multenombrajn ordenojn pro kelkaj militmeritoj. Nun li estas deputato el la distrikto de Albaida'o (Valencio). Sed lia tuta populareco estas nune kiel prezidanto de la Valencio Komerca Ateneo.

Tre estimata de ĉiuj kaj de ĉiuj helpata, li entreprenis antaŭ kelkaj monatoj la efektivigon de la grandioza Regiona Ekspozicio, kiun nun admiras kaj aplaŭdas ĝiaj multenombraj vizitantoj.

La Ekspozicio, la gravega homa laborelmontrejo de la Valencio Regiono, solene inaŭgurita de la hispana Reĝo, lia Moŝto Alfonso XIII, estas instalita sur plataĵo je 140.000 kvadrataj metroj. En ĝi vidiĝas la Palaco de la Industrio; de Publikaj Laboroj, Provinca Deputataro, Reĝa Familio, Agrikulturo, Urbeŝtaro, Maŝinoj, Granda kazino, Belaj Artoj, kaj la Granda Areno (Festejo) je 100 metroj vastampleksa, kaj multaj aliaj por Societoj, korporacioj kaj privatuloj; Amuzaĵoj, Teatro, Cirko, Kinematografo, *Toboggan*, Rusa Montaro, k. t. p., kiujn oni ne povus priskribi eĉ en la tuta numero de LA SUNO HISPANA.

Tiu ĉarma Ekspozicio estis starigata dum malpli ol duonjaro kaj la miraklo okazis, kvazaŭ el ĉiuj anguloj de la Mediteraneo (la baneĝejo de la plimulto el la artistoj), alvenis samtempe iliaj kisoj por amasigi en tiun Ekspozicion unu el la plej belaj artaĵaroj kiun oni vidis en la mondo. Jen, tio, kion la valencianoj ŝuldas al la entuziasmo, talento, bonfaremo, kaj altrangeco de sinjoro Tomás Trenor.



La Kvina Kongreso

Plie, ke, kiel ni jam diris, Lia hispana Reĝa Moŝto Alfonso XIII^a akceptis la altan patronadon de nia Kvina Kongreso, lia Moŝto Ministro pri alilandaj aferoj ordonis al niaj reprezentantoj en fremlandoj, ke ili petu de la registaro de la landoj, kie ili ĉestas, ke oni sendu delegitojn al Barcelona'0.

Doktoro Zamenhof tien alvenos la dekan horon de la dimanĉo la 5^{an} de Septembro, kaj oni lin faros oficialan akcepton.

En la Palaco de Belartoj fariĝos la malfermo kaj ceteraj aktoj de nia Kongreso, kaj estos *akceptejo* la Universitato, kien devas aliri ĉiu alvenonto por ke oni lin informu pri tio, kion al li interesas.

La Urbeŝtaro, la Komerca Ĉambro, la Ateneo, la muzika societo *Orfeo*, kaj aliaj societoj, helpas nin:

Oni ludos, esperante, dramon «Mistero de Doloro», pri kio sin okupas la fama artisto Adria Gual ĝia verkisto.

La Barcelonaj esperantistoj surportos insignon kaj ĝentite informos pri sia urbo la fremdulojn.

La francaj fervojoj decidis rabaton da 50 % de la 25^a Aŭgusto ĝis la 25^a Oktobro kaj pli malpli la hispanaj, de la 16^a Aŭgusto ĝis la 1^{an} Oktobro.

Gravajn ekskursojn oni preparas, kaj ĉio esperigas sukcesegon de la hispana Kongreso.

La Patrineto

Inter la miloj da vortoj, kiuj formas la riĉecon de la tutmondaĵ lingvoj, ekzistas vorto de senegala riĉeco, de balsama bonodoro, kies elparolado produktas en niaj oreloj, harmonion tiel dolĉan, tiel belsonan, tiel ĉarman, kiun neniel oni povas kompari kun la akordoj produktitaj de la instrumento plej delikata, kiam ĝi estas ludata de anĝelaj manetoj.

Kia ĝi estas?... vi diros al mi karega leganto. Ha! certege vi ĝin konas; estas la vorto... Patrineto!

La unua kiun ni elparolas, eĉ neniam ĝin lerninte; estas nia unua korbato.

Patrino, Patrineto! estas la patrujo de l' amo, kolekto de mirindaĵoj, fonto de ĉiu boneco kaj plezuro; ĝi estas granda, anĝela kaj necesega ekzistaĵo en la mondo.

Se en la vizaĝo de nia patrino ni vidas ekbrili senĉese la plej dolĉan rideton, ĝi estas tiel, ke ŝia koro gardas riĉan trezo-

La Madrecita

Entre los millares de palabras que constituyen la riqueza de las lenguas, existe una de sin igual valor, de fragancia balsámica, cuya pronunciación produce en nuestros oídos una armonía tan dulce, tan sonora, tan encantadora, que de ningún modo se puede comparar con los acordes producidos por el instrumento más delicado al ser pulsados por manos angélicas.

Cuál es? Me dirás, lector querido. Ah! ciertamente la conoces: es la palabra... Madrecita!

La primera que pronunciamos sin haberla jamás aprendido; es el primer latido de nuestro corazón.

Madre, Madrecita! es la patria del amor, conjunto de maravillas, fuente de toda dicha y placer; es un ser grande, angelical y necesario en el mundo.

Si en el rostro de nuestra madre vemos brillar incesantemente la más dulce sonrisa, es porque su corazón guarda un

ron, tial, ke en ŝia brusto ekzistas vulkano de amo, kies brulanta fajro malŝparas la ventegojn de ĉiuj niaj penadoj.

Diras glora verkisto: «Kie ajn oni trovas malfacilaĵon por plenumi, tien la Ĉiopova Dio enmetis la amon por ĝin fari akceptebla.» Kaj, kiel la sorto altega de patrino havas ŝin antaŭdestinatan por la plej grandaj oferoj, tial la bonega DIO enmetis en ŝian koron grandegan fonton da amo.

Certe! Kiel patrino, sen amo, al ŝiaj infanoj, atentus ilian konservadon, kaj suferus pacience la sennombraj ĝenojn de ilia edukado kaj nutraĵo? Ha jes, tiu-ĉi amo malplipezigas kaj dolĉigas ŝiajn penadojn, faras akceptebla tion, kion la naturo elpelas, kaj la magia forto de ŝia amo estas tiel granda, ke ĝi efektivigas, kiel per sorĉo, kion la homa prudento konsideras kiel tute nebla.

Jes!... Ekzistas nek murego, kiun Patrino ne rampu, nek abismo, kiun ŝi ne sondu, nek rivero, kiun ŝi ne vadu nek ardita militistaro, kiun ŝi ne rompu kaj malfaru, kiam ŝi marŝas serĉante la karan fileton de ŝia koro.

Feliĉa mi estas, ĉar mi havas Patrinojn! Feliĉaj, kiuj povas enmeti en siajn lipojn tiun ĉi dolĉan esprimadon.

Patrino, Patrineto mia, kiel bona vi estas! Nenio, nenio ekzistas en la mondo, kio kun vi iel oni povu kompari...

MARIANO PLANA, *Eskolapiulo*.

rico tesoro, porque en su pecho existe un volcán de amor, cuyo fuego abrasador disipa las borrascas de todos nuestros dolores.

Dice un ilustre escritor: «Donde quiera que se encuentran dificultades que cumplir, allí colocó Dios el amor para hacerlas aceptables.» Y como la suerte altísima de una Madre la tiene predestinada para los más grandes sacrificios, por eso nuestro buen DIOS depositó en ella un gran manantial de amor.

En verdad! Cómo una madre, sin el amor hacia sus hijos, cuidaría de su conservación y sufriría paciente las numerosas molestias que consigo lleva su alimentación y educación? Ciertamente este amor aligera y dulcifica todos sus dolores, hace aceptable lo que la naturaleza rechaza, y su fuerza mágica es tal, que realiza como por encanto lo que la prudencia humana considera como de todo punto imposible.

Sí!... No existe muralla que no escale, ni abismo que no sondee, ni río que no vadee, ni ejército aguerrido que no rompa y desbarate una Madre, cuando arrasada por el amor va en busca del hijo querido de su corazón.

Dichoso yo que tengo Madre! Dichosos todos los que pueden poner en sus labios esta dulce expresión:

Madre, Madrecita mía, que buena eres! Nada, nada hay en el mundo que contigo se pueda comparar...

MARIANO PLANA, *Escolapio*.

Bibliografio

Barcelona.—Deskriptiva broŝuro.—La grafa urbo Barcelono sin pretas por honore akcepti la anojn de la V^a Esperantista Kongreso; ĵus la «Societat d'Atracció de Forasters» eldonis belan kaj arte presitan gvidlibreton, kiu entenas priskribojn de la multnombraj monumentoj vizitotaj de la Kongresontoj.

Oni povas senpage ricevi tiun gvidlibreton petante ĝin al la «Societat d'Atracció de Forasters».—Rambla del Centre, 30, entresol. Barcelona.

La infano, la saĝulo kaj la diablo, dua broŝureto de la «Verd-stelo» serio, originale verkita angle de Coulson Kernahan, eldonita esperante de J. C. O' Connor.—Prezo 0'25 Sm. afrankite. Oni sin turnu al *Centra Angla Esperantejo*, 17, St. Stephens Square, Bayswater. London. W.

Hispana Societo por propagando de Esperanto

La dektrian tagon de tiu ĉi monato kunvenis en Burgos'o ĝia agema Direkta Komitato kaj aŭdinte la opiniojn de ĉeestantaj kaj forestantaj samideanoj, pri tiamaj traktontaj aferoj, unuvoĉe oni decidis:

Stimuli kaj helpi la esperantan lernadon de la grupoj, per diplomoj, facilakiro de libroj, honoraj titoloj al la profesoroj, k. t. p.

Interesi la hispanan presaron, neesperantistan, ke ĝi propagandu nian aferon.

Starigo de Ĉiama Komitato por Propagando kaj Organizado, konsistanta el: Prezidanto kaj eksprezidantoj de H. S. p. p. de E.—Ĝiaj. Sekretario kaj eks-sekretarioj.—La hispanaj membroj de «Lingva Komitato».—La aŭtoroj de lernolibroj aŭ aliaj verkoj, notinde meritaj.—La personoj distingigintaj aŭ distingigontaj pro sia esperanta klereco kaj specialaj servoj, laŭ komitata opinio.

La Komitato tuj funkciados per la tri unuaj nomitaj grupoj de personoj, kaj tiuj ĉi nomos la aliajn, el la kvara kaj kvina, kiuj ĝin kompletigos.

La Prezidanto kaj sekretario de tiu Komitato estos tiuj de H. S. p. p. de E.

Kroniko

Sinjoro Ernest Pointer la junulo, kiu aktive propagandis esperanton en Britujo, mortis.

Ankaŭ tute forlasis nin la eminenta filozofo, esperanta amiko, S-ro Ernesto Naville.

Argentino.—Sub la titolo «Esperanta Psikistaro» fondiĝis Internacia Unuigo de psikikaj lernadoj per esperanto.

Tiu Societo sin turnas al ĉiuj esperantistoj, kiuj same estas psikistoj, hipnotistoj, magnetistoj, telepatistoj, spiritistoj, teosofistoj, k. t. p. kaj ankaŭ al ĉiuj psikistoj, kiuj volas esti esperantistoj.

Ĝia iniciativa komitato loĝas en Anvers, st. S. Antoine, 25, (Belgujo). La esperantistaj psikistoj konsideras ilian societon, kiel praktikan rimedon de frateco.

Ni eltiras tiujn ĉi bonajn sciigojn de «Revista Magnetologica» kiu publikigas en Buenos Aires, kie la nomita Societo malfermis esperantan kurson.

Crónica

El joven Sr. Ernesto Pointer, que activamente propagó el esperanto en Bretaña, ha muerto.

También nos ha abandonado el eminente filósofo amigo del esperanto, señor Ernesto Naville.

Argentina.—Bajo el título «Esperanta Psikistaro», se ha fundado una Unión Internacional de estudios psíquicos mediante el esperanto.

Esa Sociedad se dirige á todos los esperantistas que á la vez son psiquistas, hipnotistas, magnetistas, telepatistas, espiritistas, teosofistas, etc. y también á todos los psiquistas que quieran ser esperantistas.

Su comité de acción reside en Amberes, calle de San Antonio, 25, (Bélgica). Los esperantistas psiquistas consideran su sociedad como medio práctico de fraternidad.

Sacamos estas buenas noticias de la «Revista Magnetológica» que se publica en Buenos Aires, donde la nombrada Sociedad ha inaugurado un curso de esperanto.

Ankaŭ oni tie instruas esperanton ĉe aliaj lernejoj.

Aŭstrujo.—«Kroata Esperantisto» nia tre kara kolego, esprimas la progreson de esperanto per jena grafika, bela frazo... «Senĉese, senhalte, progresadas, kaj, kiel fungoj post pluvo, fondiĝas esperantaj societoj kaj gazetoj ĉie sur la terĝlobo».

Azia Turkujo.—En Mosul'o, Smirna'o kaj Sojka'o estas grava movado favora al esperanto.

Same en Aĵdĵno, kie nia kara lingvo estis enkondukata en lernejojn turkajn kaj hebreaĵn.

Belgujo.—Novaj grupoj en Gent'o, Sankta Giles'o kaj Verviers'o.

Bohemujo.—Grupo fondiĝis en Leipao kaj alia en Niedergrund'o.

Brazilujo.—Novaj grupoj en Amparo kaj Sakramento.

Brazila Klubo ricevis oran medalon en tiea Nacia Ekspozicio pro la merito de nia lingvo.

Per diversaj agoj montriĝas la progreso de esperanto en Belemo, Parahyba'o, Maceio, Rio de Janeiro, Campinas'o, Jundiahjo, Guarantigetao, Keluz'o kaj Kruzeiro.

Kolombio.—En Sankta Josefo de Kulkula'o oni fondis la unuan esperantistan grupon de tiea lando.

Danujo.—«La Esperantista Ligo» kunvenos la 13^{an} Julio en Aarhus, kies okazas nacia ekspozicio. Fremdaj esperantistoj estas invititaj. Esperanta Oficejo. Frederiksberg, 26, Copenhague.

Francujo.—Novaj grupoj ni havas: Abbeville'o, Mantes'o, Korbeil'o kaj Luĉon'o.

S-ro Luis Carlos, 7, rue Rollin, Paris, deziras adresojn de esperantistoj tipografistoj, ĉar oni intencas formi «Internacian Ligon de Tipografistoj».

En internacia ekspozicio, kiu okazas en Nancy'o estas speciala esperanta fako.

S-ro Gaudin muzikestro de la 51^a regimento en Beauvais'o aranĝis la himnon «Espero» por militista marŝado.

Tambiĝn se enseña allĝ esperanto en otros lugares de enseñaanza.

Austria.—«Kroata Esperantisto», nuestro muy querido kolega, expresa el progreso del esperanto por la siguiente grĝfica bella frase... «Sin cesar, sin detenerse, progresa, y como los hongos despuĝs de haber llovido, se fundan sociedades de esperanto y periōdicos, en todas partes del mundo».

Turquĝa Asiĝtica.—En Mossul, Smirna y Sojka hay un importante movimiento favorable al esperanto.

Lo mismo en Aĵdĵno, donde nuestro querido idioma fuĝ introducido en las escuelas turcas y hebreas.

Bĝlgica.—Nuevos grupos en Gante, San Gilles y Verviers.

Bohemĝa.—Se ha fundado un grupo en Leipa y otro en Niedergrund.

Brasil.—Nuevos grupos en Amparo y Sacramento.

El Club del Brasil ha recibido una medalla de oro en la Exposiciōn Nacional de allĝ, por el mĝrito de nuestro idioma.

Por diversos hechos se demuestra el progreso del esperanto en Belem, Parahyba, Maceio, Rĝo de Janeiro, Campinas, Jundiahjo, Guarantiguetao, Keluz y Cruzeiro.

Colombia.—En San Josĝ de Cucula, se ha fundado el primer grupo esperantista de aquel paĝs.

Dinamarca.—«La Liga Esperantista» se reunirĝ el 13 de Julio en Aarhus, donde se verifica una exposiciōn nacional. Los esperantistas extranjeros estĝn invitados. Oficina esperantista, Frederiksberg, 26, Copenhague.

Francia.—Nuevos grupos tenemos: Abbeville, Mantes, Corbel y Luchon.

El Sr. Luis Carlos, calle de Rollin, 7, Parĝs, desea direcciones de esperantistas tipōgrafos, porque se intenta formar una «Liga Internacional de Tipografistas».

En la exposiciōn internacional que se verifica en Nancy, hay una secciōn especial de Esperanto.

El Sr. Gaudĝn, mĝsico mayor del Regimiento 51 en Beauvais, ha arreglado el himno «Espero» para banda Militar.

Holanda maristo vundita en la Kaen'a haveno estis alportita al tiea hospitalo. Komence ne eble la interkompreno inter li kaj la servantaro de la malsanulejo, sed felice unu oficisto kaj la vundito mem estas esperantistoj kaj lumo fariĝis.

Sankta Etienne'a ilustrita gvidlibreto aperis kun esperanta fako pri la tiea esperanta vivo.

Firmo «Lit sans pareil» 27-29, Boulevard Voltaire, Parizo, sub la titolo «Chambre Esperanto» vendas malkaran meblaron por dormoĉambro.

«Franca Esperantisto» raportas bonege pri vizito al Barcelono de S-roj Bourlet kaj barono de Menil, kaj bonege opinias pri la sukceso de la kvina Kongreso.

Sub nomo «Havra esperantista komercejo» (7, St Helene, Le Havre) stariĝis firmo kiu sin okupas pri la enporto kaj vendado de transoceanaj produktaĵoj.

S-ro Carlo Bourlet estis nomata Vicprezidanto de la «Konstanta Komitato de Kongresoj» kaj S-ro Gabriel Chavet, ĝia ĝenerala sekretario.

Ĉe la plimulto el la grupoj de tiu lando la afero iras ĉiam antaŭen.

Germanujo.—Novaj grupoj fondiĝis en Gleiwitz'o, Klotsche'o, Striesen'o, Worishofen'o, Dobeln'o, Eslingen'o, Memmingen'o, Pieschen'o, Reichenhall'o, Ruhland'o kaj Senftenberg'o.

La Gera'a urbestro ordonis al la policianoj lerni esperanton.

En Königsberg «Ruĝa Kruco» instruas esperanton al flegistinoj kaj malsanulportistoj.

En Dresden'o 60 oficistoj de Saksia-Bohemia «Ŝipveturada Societo», lernas esperanton.

La Tilsit'a ĵurnalo «Allgemeine Zeitung» sciigas, ke London'a polico malkaŝis bandon de ŝtelistoj per ilia korespondado esperante. Okaze tio ĉi, eble la registaroj ion ordonos favora al nia ĉiam dezirata propagando de esperanto.

Un marino holandés herido en el puerto de Caen, fué llevado á aquel hospital. Al principio era imposible la inteligencia entre él y la servidumbre del hospital, pero felizmente un empleado y el herido mismo eran esperantistas y se hizo la luz.

Ha aparecido una guía ilustrada de Saint-Etienne, con sección de esperanto respecto á la vida esperantista de allí.

La casa «Lit sans pareil» 27-29, Boulevard Voltaire, Parizo, sub la titolo «Cuarto Esperanto» vende mobiliario barato para dormitorio.

«Franca Esperantisto» hace magnífica referencia de la visita á Barcelona de los Sres. Bourlet y barón de Menil y magníficamente opina respecto al éxito del 5.º Congreso.

Bajo el nombre de «Esperantista depósito del Havre», calle de Santa Elena, 7. El Havre, se ha establecido una casa de comercio que se ocupará de la importación y venta de productos coloniales.

El Sr. Carlo Bourlet ha sido nombrado Vice-presidente del «Comité Permanente de Congresos», y el Sr. Gabriel Chavet, secretario general.

En la mayoría de los grupos de este país. el asunto va siempre adelante.

Alemania.—Se han fundado nuevos grupos en Gleiwitz, Clotsche, Striesen, Worishofen, Dobeln, Esslingen, Memmingen, Pieschen, Reichenhall, Ruhland y Senftenberg.

El Ayuntamiento de Gera ha dispuesto que los policías estudien el esperanto.

En Königsberg «La Cruz Roja» enseña esperanto á los enfermeros y camilleros.

En Dresden, 60 empleados de la Sajona-Bohemia «Sociedad de viajes en vapor» aprenden el esperanto.

El diario de Tilsit «Allgemeine Zeitung» informa que en Londres un policia ha descubierto una cuadrilla de ladrones, por la correspondencia de estos en esperanto. Con motivo de esto, quizás los gobiernos dispondrán algo favorable á nuestra siempre deseada propaganda del esperanto.

En Bad-Reichenhall, konata kuracloko, kien ĉiusezone venas multe da fremduloj, oni laboras por ilia esperantigi.

La Danzig'a grupo havas cent kvardek membrojn.

Fondiĝis «Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj».

Informas S-ro R. de Ladeveze, Hamburgo, 6, Altonaerstr, 67.

Grekujo.—La grava ĵurnalo el tiea lando «Akropolis» kaj aliaj, fervore propagandas esperanton en tiu lando.

Daŭrigas ĝian lernadon en la kursoj de Samos'o kaj Patras'o kaj alia komencis en Etolikon'o.

Hungarujo.—Dum la «XVI^a Medicina Internacia Kongreso», kiu okazos en Budapeŝto de la 29^a Aŭgusto ĝis la 4.^a Septembro, la esperantistaj kuracistoj estos plezure akceptataj de la «Hungara esperantista Societo», kiu preparas esperantan loĝejon. Sin turnu al Sekretario oficejo VII Alpar, n. 8, Budapeŝto.

Ĥinujo.—Baldaŭ aperos fina esperantista ĵurnalo.

Italujo.—Problindula Kongreso okazinta en Napolo aprobis proponon pri enkonduko de esperanto en la blindulejon.

Sinjoro Tellini malfermis esperantan kurson en Bolognia'o.

La Komitato de la «Internacia Ekspozicio de arto, laboro», nutrado kaj higieno tie okazinta dum lastaj Marto kaj Aprilo, decidis uzi esperanton por la rilato kun eksterlanduloj.

Japanujo.—En Kioto fondiĝis societo celadanta interkomuniki esperante inter tieaj knaboj kaj tiuj de la tuta mondo.

Nia kara kolego «Samideano Ĉiumonata», de Majo eliras preslitere farita, kaj disdonos kun ĉiu numero kolorigitan originalan pentraĵon de Japano, Ĥino aŭ Koreo. Tiu speciala publikigaĵo estas rekomendinda.

Koŝinĥinujo.—Tiea Konsilantaro donacis du-cent piaŝtrojn al la Saigon'a grupo.

En Bad-Reichenhall, konocido sanatorio adonde cada estación llegan muchos forasteros, se trabaja para hacerlos esperantistas.

El grupo de Dauszig'a tiene ciento cuarenta miembros.

Se ha fundado la «Unión Internacional de Esperantistas Vegetarianos».

Informa el Sr. R. de Ladevere, Hamburgo, 6, Altonaerstr, 67.

Grecia.—El importante diario de aquel país «Acropolis» y otros, propagan fervorosamente el esperanto en aquel país.

Continúa su estudio en los cursos de Samos y Patras y ha empezado otro en Etolikon.

Hungria.—Durante el «XVI Congreso Internacional de Medicina» que tendrá lugar en Budapest del 29 de Agosto al 4 de Septiembre, los médicos esperantistas serán con gusto recibidos por la «Sociedad Hungara Esperantista» que prepara posada esperanta. Dirigirse á Sekretari oficejo VII Alpar, n. 8, Budapest.

China.—Pronto aparecerá un diario esperantista chino.

Italia.—El Congreso para ciegos verificado en Nápoles, aprobó la proposición referente á la introducción del esperanto en el asilo de ciegos.

El Sr. Tellini ha comenzado un curso de esperanto en Bolonia.

El Comité de la «Exposición Internacional de arte, trabajo, alimentación é higiene», que allí tuvo lugar en Marzo y Abril últimos, ha decidido usar el esperanto para sus relaciones con los extranjeros.

Japón.—En Kioto se ha fundado una Sociedad, cuyo propósito es la mutua comunicación en esperanto, entre muchachos de allí y de todo el mundo.

Nuestro querido colega «Samideano Ĉiumonata», sale desde Mayo con letra de imprenta y repartirá con cada número un dibujo original iluminado, del Japón, China ó Corea. Esta original publicación es recomendable.

Cochinchina.—El Consejo de allí, ha dado doscientas piastras al grupo de Saigon.

Kroatujo. — En Bjelovar'o fondiĝis grupo.

Manĝurujo. — En Ĉarbin'o fondiĝis «Manĝura Esperanta Societo».

Maurici'a Insulo. — Fondiĝis grupo en Port Louis.

Norvegujo. — Estas fondita «Universala Studenta Unio». Sin turnu al Sinjoro S. Engesgaar Christie-Kristiania, Skowejen, 17.

Portugalujo. — Grupo fondiĝis en Gaya'o.

La 21^{an} lasta Majo okazis esperantista festo en Lisabono por disdoni premiojn al la pli bonaj lernantoj el la lasta esperanta kurso.

Ĉe estis la tieaj pli gravaj esperantistoj kaj oni laŭdis bonegan ekspozicion aranĝitan okaze la festo.

Rusujo. — En Moskvo oni kalkulas ĉirkaŭ cent tri-dek anoj en la grupo.

Tie, okaze la kunveno de rusaj esperantistoj kuracistoj, brave deklamis esperante sesjara filino de S-ro Ŝabunjeviĉ.

La Tiflis'aj, Taskent'aj, Voronej'aj kaj Tomsk'aj esperantistaj progresigas la aferon.

Nia estimata kolego «Ruslanda Esperantisto» proponas Ruslandan Kongreson de Esperantistoj la 2^{an} (15^{an}) de la proksima Decembra monato, kiun tago Doktoro Zamenhof farigis kvindek-jara. La ceteraj esperantistoj kaj mem la rusaj esperantistoj, ni povus sendi tiun tagon al la senmorta elpensisto, ilustritan poŝtkarton lin salutante, per kies rimedo li akirus poŝtkartkolekton kaj autografkolekton de siaj admirantoj. Tiu ĉi belega ideo, kiun ni akceptas kaj plenumos, estas de nia kara agem'a samideano la leŭt-kolonelo S-ro Eugenio Calvo.

En la Mihajlowskij rajdejo de Peterburgo okazas Internacia Ekspozicio de la plej novaj elpensadoj, kaj altiras la publikan atenton kiosko de «Ruslanda Esperantista Ligo».

Saĝulo kaj tre respektinda S-ro Lev'o Tolstoj, donante pruvon de sia simpatio

Croacia. — En Bjelovar, se ha fundado un grupo.

Manchuria. — En Charbín se ha fundado la «Sociedad de Esperanto de Manchuria».

Isla de Mauricio. — Se ha fundado un grupo en Port Louis.

Noruega. — Se ha fundado la «Unión Universal de Estudiantes». Dirĵense al Sr. S. Engesgaar Christie-Kristiania, Skowejen, 17.

Portugal. — Se ha fundado un grupo en Gaya.

El 21 de Mayo último hubo una fiesta esperantista en Lisboa para repartir premios á los mejores alumnos del último curso de esperanto.

Concurrieron los esperantistas más importantes de allí y fué alabada la magnífica exposición allí dispuesta con motivo de la fiesta.

Rusia. — En Moscow se calcula que hay alrededor de ciento treinta socios en el grupo.

Allí, en ocasión de haberse reunido los médicos rusos esperantistas, brava-mente declamó en esperanto una niña de seis años, hija del Sr. Ŝabunjeviĉ.

Los esperantistas de Tiflis, Taskent, Voronej y Tomsk, hacen progresar el asunto.

Nuestro estimado colega «Ruslanda Esperantisto» propone un Congreso de esperantistas rusos, el día 2 (15) del próximo mes de Diciembre, en cuyo día el Dr. Zamenhof cumple cincuenta años. Los demás esperantistas, y hasta los mismos rusos, podíamos enviar ese día al inmortal inventor, una postal ilustrada saludándole, por cuyo medio él adquiriría una colección de postales y una colección de autógrafos de sus admiradores. Esta magnífica idea, que aceptamos, y llevaremos á cabo, es de nuestro activo samideano el Teniente Coronel Sr. Eugenio Calvo.

En el picadero Mihajlowskij de Peterburgo tiene lugar una Exposición Internacional de los más nuevos inventos, y atrae la atención pública el kiosko de la «Liga Esperantista Rusa».

El sabio y muy respetable Sr. Leon Tolstoj, dando prueba de su simpatía por

MAR. Cu vi intencas ĉi tie resti ankoraŭ longe? Eĉ multe defendante tion ĉi, vi ja estas laca... Tiu ĉi nia vivado!... La karaktero de Jozef-Ludoviko!...

EMAN. Ĉu vi kredos ĝin?... Eĉ tio min distras la malkonsentoj kaj malpacetoj kun mia kara frato... Bedaŭrinda Jozef-Ludoviko! Malgraŭ ĉio mi lin amas. Li estas dorlotata infano... Li ĉiam havis iun, lin dorlotantan... Feliĉa li! Liaj petolaĵoj estas infanaj; li estas pliĝa, ol mi, kaj mi traktas lin, kvazaŭ li estus plijuna frato. Mi uzas por li la sentojn de patreco, kiuj ekmontriĝas ĉe mia aĝo... Oni sentas deziregon protekti, direkti estaĵon pli malfortan... Kaj en tiu ĉi domo estas du, li kun sia senpacienco kaj egoismo de malsana infano; vi kun via nekvieteco kaj prizorgoj de amanta patrino... Mi estos la fortulo, la amo, kiu protektas kun energio, sen moleco... la patro... la bopatro, kio estos necesa... Kompreneble, se vi ne forpelas min el ĉi tie, kiel ĝenulon!...

MAR. Mi, ne, Emanuelo. Vi povas kredi ĝin.

EMAN. Mi havas mian planon. Tuj kiam la malvarmeo ĉesos kaj Jozef-Ludoviko aranĝos tiujn aferojn, ni faros vojaĝon, ĝi estas je mia kalkulo. Tra gajaj landoj de blua ĉielo kaj fajra suno, de floroj kaj kantoj... Tra Andaluzio, tra Italujo... Seviljo, Malago, Venizo, Napolo... kie ektagiĝas pli lume kaj vivo per si mem estas gajeco; kie la malriĉuloj kantas kaj la vento dolĉebruas kaj la maroj lulas... Landoj, kiujn Dio benas!... Kie eĉ pekado ne estas peko! Jen kion Jozef-Ludoviko bezonas por resaniĝi. Bano en pura aero saturita de lumo kaj gajeco... kaj

vi ankaŭ... kara infanino! por ke viaj okuloj akiru lumon kaj via brusto spiru sen premiĝo... sen larmoj, nek ekĝemoj... ĉar kun via malgaja beleco, vi ŝajnas al mi dolorata virgulino de tiu ĉi peniga kalvario de la vivo...

MAR. Ne logu la imagadon per tiel plaĉiga perspektivo... Mi bone scias, ke ĝi ne okazos. Jozef-Ludoviko ne estas malsana, nur kredas sin malsana...

EMAN. Vi ĝuste trafis!

MAR. Li estas nature malgaja kaj kontentiĝas per malgajeco... La lumo lin doloras!... Eĉ ne proponu al li tiun vojaĝon... Iru vi sola...

EMAN. (*Kun malvigleco*). Sola?... Sola, ne!

SCENO II

LA SAMAJ kaj JOZEF-LUDOVIKO (*Eniras sekrete*)

MAR. (*Renkontiĝante subite kun li, ektimigita*). Ve!

EMAN. Jozef-Ludoviko!

Joz. Ĉu mi ektimigis vin?

MAR. Vi eniris subite... Ĉu vi ne sonorigis?

Joz. Juljano estis eliranta...

MAR. (*Flanken*). (Ne estas dubo, li kunportas ŝlosilon por eniri neaŭdate... Kion li suspektas de mi? Dio mia!)

EMAN. (*Al Jozef-Ludoviko*). Kontraŭ vi... ne, pli bone, por vi ni estis konspirantaj...

Joz. Jes, mi jam rimarkas, ke vi estas ĉiam kune... en konspirado, videble.

MAR. (*Flanken*). (Lia suspekto estas terura! Mia koro

indignas... ĝi jam estas kolero, pli ol malĝojo, kion mi sentas...)

EMAN. Ni havas planon...

JOZ. (*Sajnigante gajecon*). Ĉiu unu planon, aŭ ambaŭ la saman?... Ĝi estas kurioza, hodiaŭ ni ĉiuj donis nin al la farado de planoj... Mi havas alian.

EMAN. Ni vidu.

JOZ. Ne. Ni vidu unue la vian. Mi ne volus, ke la mia ĝin malaranĝu,

EMAN. La afero estas pri vojaĝo...

JOZ. Pri vojaĝo?... Ĉu oni devos do kredi pri tio, kion oni nomas sugestio en malproksimeco? Pri vojaĝo ankaŭ estas mia plano... (*Firme*). Tiun ĉi semajnon mi veturos Parizon kun Mario.

MAR. (*Flanken*). (Li malkonfidis pri mi! Li volas min disigi de sia frato!...)

EMAN. (*Kun esprimo de strangeco*). Tiun ĉi semajnon?...)

JOZ. Oni parolis al mi pri negoco en projekto... Mi iros ĝin studi, kaj okazokapte mi plenumos mian promeson al Mario.

EMAN. Mi kredis, ke vi iros ripozadi. Vojaĝo por negocoj... ne penindas!...

JOZ. Mi bedaŭras vin forlasi... Sed vi ja scias, ke vi povas restadi ĉi tie tiom longe, kiom vi volos. La domo estas je via dispono.

EMAN. (*Seke*). Dankon. (*Flanken*). (Li min elpelis de ĉi tie... mi ne volus kompreni kial!)

MAR. (*Ne povante sin deteni*). Tiel urĝa, do, estas tiu vojaĝo? Ĉu ni ne povus atendi?

EMAN. (*Helpante*). La Pariza klimato en tiu ĉi sezono ne estas tre favora al via malsanado.

JOZ. (*Suspekteme*). Estas sprite! Vi senĉese disputas

por ke mi lasu miajn aferojn, foriru de Madrido kaj penu min distri... kaj nun kiam mi jen proponas tion, ĝi malplaĉas al vi kaj vi kontraŭstaras.

MAR. (*Protestante*). Kontraŭstari? Ne.

JOZ. Kia estis via plano? Tiu plano, kiun vi estas kombinantaj tagojn kaj tagojn, en longaj sekretaj interparoloj...

MAR. Sekretaj, ne... Ĉiu ajn povas ilin aŭdi. Emanuelo proponis vojaĝon tra Italujo...

JOZ. (*Intence*). Li povas ĝin fari.

EMAN. (*Decide*). Mi ekveturos hodiaŭ vespere.

MAR. Ĉu vi foriras?

JOZ. Li jam restis longe ĉi tie... Li eble enuas.

MAR. Sed hodiaŭ vespere... tiel, subite.

EMAN. (*Al Mario*). (Mi foriras, antaŭ ol oni min elpelos).

MAR. (Li komprenis!... Mi mortas pro honto!)

EMAN. Mi iras pretigi ĉion... Baldaŭ mi lasos vin trankvilaj. (*Eliras*).

SCENO III

JOZEF-LUDOVIKO *kaj* MARIO

JOZ. (*Gaja kaj animita kvazaŭ li estus formetinta de si ŝarĝon*). Tiel ni povas forveturi sen zorgo... Ni luos domon en Parizo... ni povas konduki tien la servistojn... Vi vidos, kiel tie ni iros ĉiuloken, al teatroj, al festoj... kiaj estas tiuj teatroj! Kia lukso!... Vi ja vidos... Kaj por vi, virinoj, tie estas pli da ĉarmoj, la vendejoj, la bazaroj... Ĉu vi ne aŭdas min?... Ĉu vi estas

malgaja?... Ĉiam malgaja kun mi!... Cu malplaĉas al vi la vojaĝo?... (*Senpacienca, kun malmildeco*). Kion vi bedaŭras lasi? Kial vi estas malgaja?

MAR. Jozef-Ludoviko, ĝi estas terura, kion vi faris!... Unuafoje mi hontis pri io! Via frato komprenas, ke vi estas ĵaluza... Kion li pensos pri mi? Ke mi estas tia virino, pri kiu oni povas suspekti tian malgloron? Cu vi pensis pri tio?... Vi ne pensis, same kiel vi ne vidas, ke de kelkaj tagoj mia vivo estas infero, ke mi sentas min mortanta... ke mi ne povas plu!

Joz. Kie ne estas kulpo, ne estas malkonfido, ke oni ĝin suspektu. Se Emanuelo komprenas, kio okazas ĉe mi... li antaŭe estas kompreninta kio okazas ĉe li.

MAR. Vi estas blinda, Jozef-Ludoviko, vi estas freneza! Kiel naskiĝis ĉe vi tiu suspekto?... Nur en ĵaluza deliro vi povis suspekti pri via frato... Sed pri mi? La ofendo estas tiel kruela, ke eĉ kredante ĝin frenezaĵo, mi ne povas ĝin pardon! Kian malsaĝaĵon, kian nesindetanon, kian facilanimaĵon almenaŭ vi vidis en mi, por kredi ĝin ebla?... Tian estimon mi meritis de vi?... interŝanĝe de tio, ke mi dediĉis al vi mian tutan vivon!... Kaj mi ja nur vivis por vi? Ĉu oferita?... Ne, ĉar amo neniam sin oferas... plaĉigita, ĉar mia sola feliĉo estis vidi vin feliĉa apud mi... kaj mi ne sukcesis! Vi neniam estis! Ĉe kio estis por mi plaĉa devigo, farita sen peno, vi vidis malvolontan submetiĝon. Ĉu vi pensis, ke amo nur povas vivi kaj ĝui en vivo de festoj, de plezuroj, kaj ke mia amo ne povos daŭri alimaniere? Ĉu vi ne vidis en mi plaĉon?

Ĉu vi ne vidis virtecon?... Tiel, do, mi estis por vi la sklavino perforte submetita, ne la virta edzino, la edzino kristana... kiu eĉ nun, vidanta rompitan la aman kunligon, humiligita, ofendita... estos fidela, estos honesta... ĉar mia patrino, honesta, kristana kiel mi, sciis enigi en mian animon, per la varmeco de preĝoj kaj kisoj, senton pli profundan, ol ĉiuj korinklinoj, ol ĉiuj homaj pasioj... Sanktan timon antaŭ Dio! Kaj se eĉ ĝi mankus al mi, la rememoro pri mia patrino min savus... Je Dio kaj je mia patrino mi estas honesta!

Joz. Vi estas, jes! Mi ne povus ne kredi tion! Por vi ne estis ofendo... Ĝi nur estas, ĉar mi scias kiel multe vi valoras kaj mi kiel malmulte... Mi scias, ke mi ne meritas vin kaj mi timis, ke oni rabu al mi vian amon... Vi ne scias, kiel mi vin amegas! Neniam mi sciis tion diri al vi!... Mi estas tiaspeca... Mi volus, ke neniu konu kiom vi valoras... eĉ vi mem ne!... Tial mi neniam diris ĝin al vi... ke nur mi vin amu... kaj nur al mi vi ŝuldu amon!... Egoismo, jes... sed por mi ja nur via amo estis en la mondo!... Malkonfido pri mi, jen kio estis mia ĵaluzo... Mi ne devis dubi, mi scias, ke ne... Pardonu... Ĝi estas mia malbeno: dubi pri ĉio...

MAR. (*Kompatanta lin*). Jozef-Ludoviko, vi portas malamon en la koro, kiu malfeliĉigas vian vivon.

Joz. Pro Emanuelo, jes!... Li estas kulpa!

MAR. Li ne estas kulpa.

Joz. (*Ne aŭdante ŝin, fundesplorante en siaj rememoroj*). Ĉiam apud vi!... Instigante vin kontraŭ mi, akrigante senĉese sian spriton por min

malkaŝe pikkritiki!... kaj vi aŭskultanta lin en ravo... (*Ekmovo de Mario*). Kaj ĉiam kunel!... Kiam mi eliris, eĉ unu solan fojon, revenante, mi ne vidis tion, ke li estas en via ĉambro... kaj la interparolo estis daŭrinta longe... Ĉiam restis tri aŭ kvar finoj de cigaroj en la cindrujo...

MAR. Eĉ tion pririmarkis via ĵaluzo!

Joz. Mi ĉion pririmarkis!.. Emanuelo vin amas... li estas deloganto, li estas cinika... multaj skandaloj estas en lia vivo... Li malvarme subfosas, atendas... Eĉ nun, se vi rememoras liajn interparolojn kun vi, vi rimarkos malicajn frazojn, kiujn vi ne atentis antaŭe... Certe, li parolis al vi pri amo... rimarkigis vin pri la unutoneco kaj malgajeco de nia vivo, parolis al vi pri aliaj ĝuoj, pri aliaj emocioj... pri arto, pri vojaĝoj... metis romanojn en viajn manojn, por ke ili parolu por li pli elokvente... Li starigis sieĝrondon ĉirkaŭ via spirito, por vin almiliti... Pripensu, rememoru.

MAR. Ne, mi ne trovas lin kulpa; eĉ reserĉante plej multe... Li ĉiam traktis min, kiel fratinon. Vi estas nejusta kontraŭ li, Jozef-Ludoviko, unu fojon ankoraŭ mi diras al vi tion.

Joz. Nur ĉar vi lin amas malgraŭ vil... Car li subjugigis vian imagadon, vi lin komparis kun mi... Li estas juna, belsintena, komplezema, viglesprita... Malgraŭ vi mem, vi komparis lin kun mi!... Malgraŭ vi mem vi bedaŭris, ke el la du fratoj mi ne estas tiu, kiu venis el malproksime!... Eble la ideo pri mia morto... mi estas malsana... se vi estus libera, ho! mi estas certa, ke vi ambaŭ pensis tion... vi kaj li kiel mi estas ĝin pensinta... Jes, jes .. Li kontraŭ mi, mi apud

vi... Eĉ kontraŭvole oni ne povas tion ne pensi!

MAR. Jozef-Ludoviko! Tio estas jam frenezo. Se vi tiel parolas, mi kredos, ke vi estas malsana, kaj kiel malsanan oni devos vin trakti.

Joz. Malsana? Ĉu vi diras freneza? Ho se tio feliĉe estus!... Pro kompatu vi estus dononta al mi la amon, kiun mi perdis... Ne, vi ne povas min ami! Malfeliĉo mia! Malgraŭ ĉio mi volas por mi vian tutan amon kaj ĉiufoje mi pliperdas ĝin!... Pardonu al mi Mario! Kompatu min! Se mia amo estas amo, ĉar ĝi estas amo; se ĝi estas frenezo, ĉar ĝi estas frenezo,... ĉiel mi bezonas vian amon... Vi estis la sola amo en mia vivo!... Se mi sciis, ke mi estas perdinta vin por ĉiam, ke mia vivo estas malhelpo por la via... ke sen mi vi estus feliĉa... Mi sen ia ajn dubo min memmortigus... kaj sen tio, ke vi ĝin suspektu por ne lasi al vi konsciencan riproĉon ĉe via feliĉeco!... (*Ploras*).

MAR. Ploru, Jozef-Ludoviko! Ploru! La larmoj malpremas la koron.

SCENO IV

LA SAMAJ *kaj* EMANUELO

EMAN. (*Parolante kun Fuljano ĉe la pordo*). Jes, reprenu ĉion. Sendigu ĉion al la hotelo... Mi tuj iros... (*Alproksimiĝante*). Mi decidis mian foriron... Mi venas diri al vi adiaŭ, (*Kortuŝita*), danki vin por ĉio... peti de vi pardonon...

Joz. (*Decide*). Emanuelo... ĝi ne estas mia kulpo.

por esperanto, permesis al S-ro Ŝarapova la tradukon de du el liaj verkoj, kaj li difinis por tio, la «Morton de Ivan Iljiĉ» kaj «Suatan Kafejon».

Svedujo.—S-ro Backman intencas organizi rondvojaĝon tra la Nordaj Landoj por liaj plej lertaj lernantaj knaboj. Ili trairos Kopenhagon, Kiel'on, Lubeck'on, Hamburgo'n, Altona'on, Berlin'on kaj Dresden'on kaj ili kantos deklamosk. t. p., por bona propagando de esperanto.

Usono.—Fondiĝis grupoj en la Crozer'a Seminario kaj en Ogden'o; en Washington la agrikulturaj oficistoj, kaj en Ottavon, Internacia Asocio de Arbaristoj, kiu eble eldonos gazeton organon.

En New-York komenciĝis la esperanta eniro per la laboroj de S-ro King kaj dudek kunuloj de li varbitaj.

Hispanujo.—Lia Moŝto S-ro Josefo Sanchez Guerra, Ministro de Publikaj Laboroj, ĝentile akceptis esti inskribata en la «Honoran Komitaton de la Kongreso». Dankegon!

En Vitoria'o ni jam havas grupon, kies komitato estas S-roj Otero, Prezidanto; Corona, Vic; Moreno, Sekretario; Cartan, Kasista; Monton, Bibliotekisto; Codina, Carné, Junquito kaj Aguirrebengoa, Voĉdonantoj.

En la biblioteka salono de la Palaco de Belartaj de San Sebastian'o okazis disdono de diplomoj al la tieaj ĝelernantoj de esperanto. La nelacebla propagandisto pastro skolapiulo Planas faris belegan paroladon.

«El Porvenir» el Cartagena'o publikigas tre bonan artikolon de Esperantisto n.º 18.645 tradukinte hispanen alian de nia kara kolego «La Ondo de Esperanto» ĉe kiu esprimas bonegan opinion pri esperanto el Moskvo'a profesoro Brandt, posedanto je dek-kvin lingvoj.

La Oviedo'a ĵurnalo «La Opinión Asturiana» per tre bona artikolo titolita «La verda stelo», de nia entuziasma samidea-

el esperanto, ha permitido al Sr. Ŝarapova la traducado de dos de sus obras y ha elegido para ello «Muerte de Ivan Iljiĉ» y «Café de Suat».

Suecia.—El Sr. Backman intenta organizar un viaje de circunvalación á través de los Países del Norte, para sus discípulos muchos más despejados. Irán á Copenhague, Kiel, Lubeck, Hamburgo, Altona, Berlín y Dresden, y allí cantarán, declamarán, etc., para la buena propaganda del esperanto.

Estados Unidos.—Se han fundado grupos en el Seminario de Crozer y en Ogden; en Washington los empleados de Agricultura, y en Ottava una «Asociación Internacional de Ingenieros de Montes», que probablemente editará una revista.

En New-York ha empezado la entrada del esperanto mediante trabajos del señor King y veinte compañeros reclutados por él.

España.—El Excmo. Sr. D. José Sanchez Guerra, Ministro de Hacienda, atentamente ha aceptado ser inscrito en el «Comité de honor de los Congresos». Muchísimas gracias.

En Vitoria tenemos ya un grupo, cuyo Comité lo forman los Sres. Otero, Presidente; Corona, Vice; Moreno, Secretario; Cartan, Cajero; Monton, Bibliotecario; Codina, Carné, Junquito y Aguirrebengoa, Vocales.

En el salón de la biblioteca del Palacio de Bellas Artes de San Sebastián, ha tenido lugar la distribución de diplomas á los estudiantes de esperanto de ambos sexos de allí. El incansable propagandista padre Planas, escolapio, hizo un magnífico discurso.

El «Porvenir de Cartagena» publica un artículo muy bueno del esperantista núm. 18.645, habiendo traducido al español otro de nuestro querido colega «La Onda de Esperanto», en el cual expresa magnífica opinión respecto al Esperanto el profesor de Moskou, Brandt, poseedor de quince lenguas.

El diario de Oviedo «La Opinión Asturiana», por muy bien artículo titulado «La verda stelo», de nuestro entusiasta

no S-ro Francisco Fernandez Braga, interesas la starigon de esperanto en la Asturias'an regionon.

La Burgos'aj ĵurnaloj sin okupas pri la senĉesa laboro de la tie ĉeestanta Direktanta Komitato de nia «Hispana Societo por propaganda de Esperanto». Ĝiajn gravajn decidojn oni vidas en alia loko de tiu ĉi numero de nia publikigado. Ni, pro ili, kore kaj respekte gratulas niajn indajn gvidantojn.

samideano Sr. Francisco Fernández Braga, interesa la instalación del esperanto en la región asturiana.

Los diarios de Burgos se ocupan de la incesante labor del Comité Director de nuestra «Hispana Societo p. p de Esperanto» allí establecido. Sus importantes determinaciones se ven en otro lugar de este número de nuestra publicación. Nosotros á consecuencia de ellas, con cariño y respeto felicitamos á nuestros dignos guías.

La Konstanta Komitato de la Kongresoj

Petas la Esperantistojn kaj la Societojn kaj Grupojn, kiuj havas proponoj por fari, rilate al la temoj studotaj de la Kvina Kongreso, ke ili volu skribi ilin, al la Prezidanto de la Konstanta Komitato, 51, *rue de Clichy, Paris*.

Tiu petu koncernas eĉ la personojn, kiuj jam eventuale publikigis proponojn en ĵurnaloj. Povas okazi, efektive, ke tian proponon, kiel ajn interesan ĝi estas, ne rimarkis la Komitatoj; kaj, oni havos la certecon ke ĝi estos konsiderata de ili, nur se ĝi estas sendita oficiale al la Prezidanto.

La Komitato memorigas, pri tio, la jenajn artikolojn de la Kongresa Regularo:

Art. 3-a. Celo de la Kongreso estas la esploro de ĉiuj demandoj komuninteresaj por ĉiuj Esperantistoj, kun escepto de la religiaj, politikaj kaj socialaj demandoj, kiuj ne devas esti tuŝataj en Kongresa kunsido, kaj de la lingvaj demandoj, kies esploro kaj solvo, estas rezervitaj al la Lingva Komitato.

Art. 4-a. Povas esti preparolataj nur la temoj enskribitaj en la tagordon. La temoj, akcepteblaj laŭ artikolo 3-a estas sempere metataj en la tagordon, se ilia esploro ne postulas specialistan kompetentecon.

La temoj, kies preparolado postulas tian kompetentecon, estas metataj en la tagordon, nur post esploro de specialista sekcio.

Memorindaj datrevenoj de Julio

- 1.—1894. Enterigo en Parizo de la franca prezidanto Sadi Carnot.
- 2.—1881. Atenco kontraŭ Garfield, prezidanto de Usono.
- 3.—1778. Mortas la glora literaturisto, filozofo, muzikverkisto kaj botanikisto I. J. Rousseau.
- 4.—1776. Deklaracio de la sendependenco de Usono.
- 5.—1899. Superakvego en Texas, kaŭzante multajn viktimojn.
- 6.—1765. Anglujo redonas Havano'n al Hispanujo.
- 7.—1808. Josefo Bonaparte ĵuras la konstitucion de Bayona.
- 8.—1621. Naskiĝas la famekonata fablisto Lafontaine.
- 9.—1746. Mortas en Madrido la reĝo Filipo V de Hispanujo.

- 10.—1841. La glora hispana oratoro Aŭgusteno Arguelles estas nomata zorganto de la Reĝino.
- 11.—1897. La neforgesinda esploristo Andreé eliras aerostate al Norda Poluso.
- 12.—1855. Mortas Tieck, germana tradukinto de la «Kinoto» de Cervantes.
- 13.—1793. Carlota Corday, mortigas la politikulon Marat.
- 14.—1807. Naskiĝas la glora poeto kaj dramaŭtoro Ventura de la Vega.
- 15.—1811. De Parizo alvenas en Madridon Josefo I.
- 16.—1898. Kapitulaco de Santiago de Kubo.
- 17.—1854. Ribelo en Madrido (Hispanujo) kaj estas bruligata la Palaco de la Reĝino Kristenino.
- 18.—1374. Mortas en Arqua la glorega itala poeto Francisko Petrarka.
- 19.—1899. Tertremo en Romo (Italujo).
- 20.—1304. Naskiĝas en Arezzo la glorega itala poeto Francisko Petrarka.
- 21.—1814. Ferdinando VII restarigas la Inkvizicion en Hispanujo.
- 22.—1822. Mortas en Liorna la poeto Shelley.
- 23.—1885. Mortas la generalo Grant, eksprezidanto de Usono.
- 24.—1794. La franca revolucia tribunalo mortekondamnas Andreo Chenier'on aŭtoro de «La Judit».
- 25.—1855. Grava tertremo en Eŭropo, precipe en Alsacia, Svisujo kaj Milano.
- 26.—1882. Unua prezentado en Bayreuth de la opero «Parsifal», de Wagner.
- 27.—1830. Unua tago de la franca revolucio.
- 28.—1794. Estas ekzekutata Robespierre kaj zo el siaj partianoj.
- 29.—1099. Mortas en Romo la papo Urbano II.
- 30.—1900. Estas mortigata en Monza la itala reĝo Humberto I.
- 31.—1822. Mortas la famekonata germana novelisto Hoffmann.

Kolektis kaj tradukis.

ESPERANTISTO 17.206.

Gazetara Statistiko

Unua kvaronjaro de 1909-a

Dum tiu kvaronjaro ni ricevis la jenajn esperantajn gazetojn:

«Voĉo de Kuracistoj», «La Revuo», «Franca Esperantisto», «Norvega Esperanta Gazeto», «La Esperanta Instruisto», «Informaj Raportoj», «Internacia Socia Revuo», «Paris-Esperanto», «La Holanda Pioniro», «Sarta Stelo», «Amerika Esperantisto», «Tra la Filatelio», «La Esperantisto», «Trezoro de l' Sorĉistoj», «La Suno Hispana», «Le Monde Esperantiste», «Bulletin Groupe-Creusot», «Dia Regno», «Kuba Stelo», «Esperanta Meksiko», «La Pioniro», «Greklingva Esperantano», «Tutmonda Espero», «Lingvo Internacia», «Sciiganto», «Esperanta Gazeto», «Svisa Espero», «Pola Esperantisto», «Notizie Esperantiste», «Dana Esperantisto», «The Australian Esperantist», «Eno Esperantista», «La Spritulo», «Germana Esperanto-Gazeto», «Normanda Stelo», «Rumana Gazeto Esperantista», «Espero Katolika», «Export Esperantist», «Juna Esperantisto», «The Esperanto Student», «Belga Esperantisto», «The British Esperantist», «Esperanto», «Oficiala Gazeto Esperantista», «La Bela Mondo», «Norda Gazeto», «La Ondo de Esperanto», «Ruslanda Esperantisto», «Eŭropa Kristana Celado», «Antaŭen Esperantistoj!», «La Verda Standardo», «La Du Steloj», «Brazilo Esperantisto», «Verda Stelo», «Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu», «Internacia Scienca

Revuo», «Samideano Ciumonata», «Rumana Esperantisto», «Kroata Esperantisto», «Germana Esperantisto», «Japana Esperantisto», «Portugala Revuo» kaj «Hungara Esperantisto».

La esperantemajn gazetojn:

«Le Phare Stenographique» kaj «Welt-Warte».

Kaj la reformemajn:

«Progreso», «L' Esperantiste» kaj «La Belga Sonorilo».

Ni ne ricevis la jenajn gazetojn.

«Esperanta Ligilo», «Stelo de l' Oriento», «Frateco» kaj «Estlanda Esperantisto».

Jen la novaj gazetoj aperantaj dum la unua kvaronjaro de 1909-a:

«Franca Esperantisto», (3 fr.), 4 fr.—46, Boulevard Magenta. *Paris*.—Francujo.

«Norvega Esperanta Gazeto», (2 fr., 10), 2 fr., 80. Sondregate, 4, IV. *Christiania*.

—Norvegujo.

«Trezoro de l' Sorĉistoj», *Leeds*.—Esperanto House.—Anglujo.

«Dia Regno», 2 fr., 25.—Strasse, 66. *Mühlheim a. Reim*.—Germanujo.

«Kuba Stelo», 5 fr.—Calvario A. 10. *Santiago de Kubo*.—Kuba Insulo.

«Esperanta Meksiko», Perpetua, 5. *Meksiko*.—Meksiklando.

«La Pioniro», 2 fr.—VI, Nagymező ú. 12, 1116. *Budapesth*.—Hungarujo.

«Greklingva Esperantano», 3 fr.—Grupo Esperantista de *Samos*.—Grekujo.

«Export Esperantist», 2 fr., 50.—404, Security Buiding. *Chicago III*.—Usono.

«La Ondo de Esperanto», 2 fr., 65.—Tverskaja, 28. *Moskvo*.—Rusujo.

«Hungara Esperantisto», 2 fr., 75 Alphár. U. 8. *Budapest*.—Hungarujo.

«Portugala Revuo», 5 fr.—215, rua del Rosario. *Porto*.—Portugalujo.

A. N.

Progresado de Esperanto

STATISTIKO DE LA UNUA KVARONJARO 1909^a

KONSULURBOJ

	5 Januaro	5 Aprilo
En Eŭropo.	254	266
En la tuta mondo.	303	319

SOCIETOJ

En Eŭropo.	992	1.099
En la tuta mondo.	1.242	1.418

ESPERANTA GAZETARO

78	86
----	----

Sprituludoj kaj Diversaĵoj

Sub la redakcio de Novejarque (Anĝelo)

AKROSTIKA VERSAĴO KAJ ĜIA AŬTORO

★★ e..i. .a.a. .e. i..i..e.a..e
 .a. e. .o..e..a★i'
 .i ..o.i.i. .o.★.o. .i. .i.a★★★
 e. a.a .e..o...i'

 .ia .o.e.' .e.★.e .u. .o.i.i.
 .a★.' a. ★a★★..e.i,
 .i .e .o.a. .a .i.o.?'—i .u. .i.i.—
 .e★o.u .i. ★. .il»

Anstataŭ la *stelojn* per literoj (*vokaloj* kaj *konsonantoj*) kaj la *punktojn nur* per *konsonantoj*, tiamaniere ke ĉiuj literoj esprimu *VERSAĴON*. La literoj anstataŭitaj per steloj, legataj laŭ la sama ordo esprimos la *nomon de la aŭtoro de l' versaĵo*.

HIEROGLIFO

C
E


Rimarkoj.—La *solvojn* de tiuj ĉi *Sprituludoj* ni presos en nia venonta numero. Ni publikigos la *nomojn de la solvintoj*, (kiuj ĝustatempe sendos sian solvon), en nia postvenonta numero.

La solvoj devas esti sendataj poŝtkarte.



Solvintoj de la Sprituludoj publikigitaj en la Maja numero:

De la *Aritmetika Sprituludo*: F-inoj Josefino Estopiñá kaj Mario Balanzá, el Valencio (Hispanujo); S-ro Julien Herla, el Verviers (Belgujo).

Solvoj de la Spritludoj de la Junia numero.—De la *Kriptografio*:
Dividu la figuraĵon laŭ la du jenaj pecoj:



kaj vi legos en ĉiu el ili:



unu *proverbon*, nome:

- 1.^a Peco: «*Esti flago por ĉiuj ventoj.*»
- 2.^a Peco: «*Paroli kiel presita libro.*»

De la *Hieroglifo*: (Antaŭ-TA-Go) Antaŭtago.

PENSO

—Malfeliĉa virino estas floro elmetita al nordvento, ĝi restadas fermita longatempe, kaj apenaŭ ĵusmalfermita, ĝi floras». — *Isabelo de Rumanujo.*

SPRITAĴO

Saĝa Profesoro.
Oni parolas en ia rondo pri iu Lingva Profesoro.

—Li estas la homo plej saĝa, kiun mi konas — aldiras unu el la ĉeestantoj.

—Kial?
—Ĉar li povas diri «Mi amas» naŭdiverslingve kaj li ankoraŭ diris tion per neniu.

UTILAJ KONINDAĴOJ

Kiam en la gorĝo enpenetriĝis dorno, ĉecas tiam engluti krudan ovon; preskaŭ ĉiam, tiu ĉi trenas la dornon.



Surversante iom da citronosuko en la akvon per kiu oni kuiras la rizon ĝi ebligas ke la grajnoj restu disigataj unu de la alia.

PROVERBO

«Azeno orhavanta, ĉion atingas.»

LASTAJ VORTOJ DE FAMULOJ

«Ĉu mi bone ludis la komedion de la vivo? Se mi ĝin plenumis bone, aplaŭdul!»
(La imperiestro *Augusto* tuj mortonta).

ANEKDOTOJ

Ravoj de la muziko.

En la kapelo de la malfeliĉa franca reĝo Ludoviko XVI-a, okaze de Sankta Semajno estis kantata iam la «Miserere» de la komponisto Lully. Ĝi estas tro longedaŭra kaj la reĝo restis genufleksata dum la tuta religia ceremonio kaj sekve ĉiuj kortegranoj ankaŭ restis genufleksataj. Kiam la ceremonio finiĝis la monarĥo al kiu la muzikon de Lully treege estis ŝatinta demandis la grafin de Gramont, kiu estis tre proksime:

—Kiel ŝajnis al vi la muziko, Grafa Moŝto?

—Via Moŝto—respondis tiu ĉi,—por la aŭdado ĝi estis bonega; sed por la genuoj, abomeninda.

Distraĵo de Scienculo.

Unu tagon la servistino de Newton avizis lin trifoje, ke lia matenmanĝo estis pretigata surtablo, kaj li, priokupata de iaj algebraj kalkuloj, ne atentis la avizon nek iris al la manĝoĉambro.

Post du horoj solvinte la problemojn Newton sentis apetiton, sed dum tiu tempo hundo estis manĝinta lian matenmanĝon kaj la servistino hontigiĝinta kaj ne volante konfesi sian malzorgon, nek la manĝegemecon de sia amata hundo, senkulpiĝis dirante al scienculo, ke li estis manĝanta siatempe. Oni diras, ke Newton kredis tion, malgraŭ la protestoj de lia stomako.

NAIVECO PRO NESCIO

Sur ferdeko.

Sinjorino rigardas tre atente la horizonton. Subite ŝi ekkrias:

—Neeble! Malgraŭ ke mi penas, mi ne povas ĝin vidi.

—Kion vi volas vidi?—demandas ŝin kunŝipvojaĝanto.

—La Ekvatoron! Hodiaŭ frumatene diris la ŝipestro ke ni ĝin trairos tage.

KURIOZAĴOJ

La virina cerbo malplipeziĝas depost la tridekjara aĝo.



Oni kalkulis, ke se la tuta Oceano senakviĝus kaj ĉiuj riveroj daŭrigus enversante siajn akvojn en ĝin, ili bezonus kvardek-mil jarojn por replenigi ĝin.

MEMORINDAJ DIROJ

Katilina rimarkigis al Ciceron lian humilan devenon.

—Mi konsentas pri tio—respondis Ciceron—mia nobeleco komenciĝas ĉe mi, sed ĉe vi finiĝas la via.



La famkonata filozofo Polemon vivadis turmentita mane kaj piede pro la podagro, kaj tre ofte li diris al siaj amikoj:

—Kiam mi volas manĝi, tiam mi ne havas manojn, kiam mi volas piediri tiam mi ne havas piedojn, sed por suferadi mi ĉiam havas piedojn kaj manojn.

Tradukis esperanten, *Novejarque (Anĝelo).*

ANONCOJ

KALALUNA SLOSILO

VORTARO

ESPERANTA - KATALUNA

Kun gramatika esperanta resumo

5 centims

CLAU CATALANA

DICCIONARI

ESPERANTO-CATALÁ

Amb un resum gramatical d'esperanto

Cekbanko Esperantista malfermas ĉekkontojn post engago de almenaŭ 20 Sm.

Oni povas pagi la plej malgrandajn sumojn per ĉekoj, kiuj estas plenvalore akceptataj de ĉiuj gravaj vendistoj kaj eldonistoj de esperantaĵoj kaj de granda nombro da esperantistaj privatuloj ĉie en la mondo, kies nomaro estas regule sendota al ĉiu karthavanto.

Cekbanka ĉeko ankaŭ taŭgas por pagi per brita mono kaj ĝi estas traktata de eksterlandaj bankistoj same kiel brita ĉeko.

Petu la regularon de *Cekbanko Esperantista*, Moston Abbey, London J. W.



INTERNACIA ILUSTRATA REVUO

Generalajn Informojn kaj literaturojn de la Ekstrema Oriento.

Jara abono 2 yen.—2 Sm.—5'10 fr.

ADRESO: *Japana Esperantisto*, Marunouchi, Tokio, *Japanujo*.

ENCICLOPEDIA ESPASA

Enciclopedia Universal Ilustrada, que ha obtenido el GRAN PREMIO en la Exposición Hispano-Francesa de Zaragoza.

La más completa de las publicadas hasta el día.

Dirigirse para suscripciones á los Sres. Espasa é Hijos, Cortes, 579, Barcelona.—Representante en Valencia: Francisco Melo, Cirilo Amorós, 24.

¡¡*Todo el mundo puede ya aprender el Esperanto!* por medio de la obra que acaba de publicarse titulada

EL IDIOMA INTERNACIONAL AUXILIAR ESPERANTO

AL ALCANCE DE TODOS

POR

Fernando Soler Valls

Oficial de Telegrafos, Presidente del Grupo Esperantista de Enguera

140 páginas de texto.—Precio: 1'50 pesetas.

De venta en las principales librerías y en casa del autor, *Enguera* (Valencia).

